LA KOROJ BATU

Muziko: Vesa Pölkki
Teksto: Anja Karkiainen



© 2000 Vesa Pölkki & Anja Karkiainen


ul - oj de - vis fa - ri, ne ebl - is e - vit'. Pa - sis cen - toj da
ku - o for - pel - iĝ - is kom - pa - to kaj plor'. Pos - te li sin ne -
trem - pa ce - las ĉi - un kaj ĉi - on sur ter'. Ĉu ĉes - ig - i ĝin
17
ta - goj koŝ - ma - raj ĉe l' fron - to sub daŭ - ra mi - nac' en ti - mo kaj zorg' pro ge -
ni - am re - tro - vis. Do, mal - graŭ ke al fa - mi - li' li do - ni plej bo - nan ja
nin ne kon - cer - nu? Ni rom - pu la ĉe - non de l' ĝem'! Kun - vi - vi en pa - co ni
21
1.,2.
ka - raj kaj re - voj pri viv' en pac'. La ko - roj ba - tis, sed mal -
pro - vis, en du - a ge - ne - ra - ci' nun ko - roj ba - tas, sed mal -
ler - nu ke po - vu en kom - pren -
25
sa - tis.
sa - tas.
29



LA KOROJ BATU

Dum ses mezsomerfestoj, kvin Juloj
servis patro en monda milit'
kiel ĉiuj tiamaj junuloj
devis fari, ne eblis evit'.

Pasis centoj da tagoj koŝmaraj
ĉe l' fronto sub daŭra minac'
en timo kaj zorg' pro gekaraj
kaj revoj pri viv' en pac'.
La koroj batis, sed malsatis.

Por elteni en tiu detruo
iĝis muta, malplena la kor'.
El la kava, dolora vakuo
forpeliĝis kompato kaj plor' .

Poste li sin neniam retrovis.
Do, malgraŭ ke al famili'
li doni plej bonan ja provis,
en dua generaci'
nun koroj batas, sed malsatas.

Pli frakasas milito nuntempa,
pli kruelas en ĝi la infer'.
Ruiniga perfort' sange trempa
celas ĉiun kaj ĉion sur ter'.

Ĉu ĉesigi ĝin nin ne koncernu?
Ni rompu la ĉenon de l' ĝem'!
Kunvivi en paco ni lernu
ke povu en komprenem'
la koroj bati sen malsati.